

Brazilei

jaro 3 n-ro 12 2009

RETROSPEKTIVO




Zamenhofa


Jaro

Intervjue



Sukcesan studjaron!





Enhavo

Parolo de spertulo		
Dr. Esperanto	08	
Esperanto-terapio		
por tria-aĝuloj	14	
Retrospektivo 2009		
Enlande kaj alilande	20	
	Feriaj kursoj	16
Interŝanĝoj de spertoj pri E-instruado en staĝo	17	
Planata retkurso pri instruado	31	
Ankaŭ nia korpo parolas... malsamajn lingvojn!	32	
Kunmetitaj vortoj - uzu ilin korekte	34	
Babilema E-kursejo en Mongaguá	35	
43-a ILEI-Konferenco	37	
	Eldiroj	04
	Karaj geinstruistoj	05
	Pliriĉigu vian vortprovizon	29

Rimarko: tiu ĉi estas la 13a eldonnumero de la revueto kaj ne la 12a, kiel erare aperas sur la ĉefkovrilo.

ilei

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Faka asocio pri instruado aliginta al
Universala Esperanto-Asocio (UEA)
www.ilei.info



Provizora Sekciestro: Joseo Tenorjo

Sekretariino: Conceição Rodrigues

Kasisto: Joel Afonso Francisco

Brazila Sekcio de ILEI funkcias
ĉefe per interreto ĉe la adreso

www.ileibr.org

geinstruistoj@ileibr.org

biblioteko@ileibr.org

butiko@ileibr.org

Poŝtadreso por korespondado

Rua Francisco Garcia, 168 - Itaquera
08230-560 São Paulo, SP - Brazilo
Telefona: (11) 2055-7978

Brazilei

aperas kvarfoje jare kaj estas eldonata
de Brazila Sekcio de ILEI

ĉefredaktanto: Joseo Tenorjo

grafikaranĝo: Joseo Tenorjo

kontakto: revuo@ileibr.org

kontrollegantoj: José Dias Pinto,
Eurico A. Ribeiro, Conceição Rodrigues

Kunlaboris en tiu ĉi numero:

Alberto Flores, Germain Pirlot,
Henri Masson kaj Paulo Sergio Viana.

Eldiroj

“Malgranda popolo ne povas progresi uzante forton kontraŭ aliaj por ekspluati ilin je sia propra profito. Ĝia forto estas en la vorto, tio estas, en strebado por edukado kaj klero. Tio validas ankaŭ por la Esperanta popolo, kiu nek povas nek volas posedi ajnajn perfortilojn. Por fariĝi pli forta kaj pli granda, nia popolo konstante eduku kaj klerigu sin. Ni lernu Esperanton ne nur, por ke la nombro de ĝia parolantaro kresku. Por ni Esperanto estu ilo, kiu helpu al ĉiu el ni kreski mem.”



Osmo Buller - Ĝenerala Direktoro
de UEA, Gazetaraj Komunikoj
de UEA, n-ro 353

“Se ni rigardas momenton al tio, kion faris niaj antaŭuloj, ni sentas nin tre malgigantaj. Sed ni, kaj nur ni kaj ĉefe la junaj ni, povas fari tion, pri kio ili eĉ ne pensis.”



Renato Corsetti - iama Prezidanto
de UEA, Komente pri la strategia
laborplano de UEA.
Revuo Esperanto 1231 (12)

Karaj Geinstruistoj



Ĉiam estas tempo por semado

Post pli ol tri jaroj da deĵorado kiel provizora gvidanto en la Brazila Sekcio de ILEI, mi devas rezigni plu deĵori en tiu enlanda instrufako pro zorgado pri mia eldonlaboro, kiun mi bezonis iom neglekti dume. Prave kaj saĝe tekstas la esperanta proverbo “Ĉiu estas fortulo en sia propra angulo”. Kaj mia amata angulo estas presado kaj grafikado.

Brazila Sekcio de ILEI estiĝis antaŭ pli ol 30 jaroj. Malgraŭ tio, oni ne sukcesis venigi la bezonatan atenton, kiun meritas tiu grava porinstruista laborfronto. La sekcion ĉiam gvidis bonvolemaj soluloj, jam superŝutitaj per multaj aliaj movadaj farenaĵoj, tial ne povante mem dediĉi iom pli el sia tempo al tiu faka deĵorado.

Eble indas memori ke, pro la enlanda lingva unueco, malmultaj brazilaj universitatanoj interesiĝas pri lingvaj studoj, tial ni povas kalkuli per la fingroj la kiomon da instrufakuloj en nia esperantista rondo.

Registrindas instrua okazaĵo kiu skuis la brazilan esperantistan movadon ĉi-jare: leĝo-projekto proponanta nedevigan instruadon de Esperanto en ĉiuj enlandaj mezlernejoj aprobiĝis en la Komisiono pri Edukado de la Brazila Senato kaj poste sekvis al la Deputita Ĉambro por plua aprobigo. Subite la esperantista komunumo montris grandan intereson pri instruaferoj... Per si mem tio estas bona instigilo. Sed baldaŭ montriĝis sub tiu tavolo da entuziasmo ĝena elreviĝo: oni volis rikolti ion el plantejo neplugita!

Kostis multe tiu neglektemo pri nia eduka plantejo. Sed ĉiam estas tempo por semado. Kaj mi vere deziras, ke tiun novan semadon ni prizorgu kiel eble plej profesie. Ne gravas kiel ni nomos niajn edukajn plantejojn: sekcio, eduka komisiono, enlanda asocio por instruistoj aŭ eldonfako... Gravas, ke tiaj plantejoj burĝonu kaj fruktodonu kaj inter si kunlaboru por la komuna celo, nome evoluigi la esperantan instrufakon en Brazilo.

Per tiu ĉi 13a eldono de Brazilo ni kompletigas la jarkolekton 2009 (kvar n-rojn). Kune kun ĝi ĉiu sekciano ricevos ĉarman agendon por registro de siaj enklasaj farenadaĵoj. Per tiu ĉi eldono, finiĝas ankaŭ mia tasko kiel redaktanto de Brazilo, kiu estas oficiala organo de la sekcio. Tial, ekde nun, se vi plu rekotizos al ILEI, vi ricevos nur ties organon Internacia Pedagogia Revuo.

Rilate la retejon de la revuo Brazilo, ĝi restos alirebla ĉe la kutima adreso <<http://ileibr.org/brazilo>> ĝis junio 2010 kiam finiĝos la kontrakto kun la reteja servilo. Sed ne maltrankviliĝu - la ideo eldoni porinstruistan revueton ne tute malaperos. Mi provos plu eldoni ĝin, kun la sama propono eldona: senpage elŝutebla por retuzantoj kaj papere abonebla por eventualaj interesigantoj. Novaĵoj pri tio oportune aperos.

Mi dankas ĉiujn amikojn, kunlaborantojn kaj partnerojn kiuj fidis al la provizoreco de tiu deĵorado kaj iel helpis, materie, klerige aŭ kuraĝige, iom profesiigi ĝin. Specialan dankon mi volas publike fari al la porinstruista retejo *edukado.net*, pere de ties redaktoro, d-rino Katalin Kováts, kiu montris, en la praktiko, senkomparan helpeman sintenon al tiu eksperimenta eldonado de la revuo Brazilei.

Laste, se iu pretas preni sur sin la gvidadon de la sekcio, bonvolu sendi mesaĝon al mia persona poŝtadreso <vortulo@gmail.com>.

Ĝis baldaŭ sur alifaka angulo de nia plantejo,

José Roberto Tenório

Transdonanto de la Brazila Sekcio de ILEI

Libro-subsenciojn ankaŭ en 2010

UEA ankaŭ ĉi-jare disdonos subsenciojn al esperantaj bibliotekoj, pere de la fondaĵo Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. Kaptu do la okazon por venigi novajn titolojn al la biblioteko de via klubo aŭ kursejo! Vizitu la katalogon de UEA (www.uea.org), pretigu liston de libroj, ordigitan laŭ dezirindeco, kaj sendu ĝin al UEA.

La peto por la ĉi-jara libro-disdono devos atingi la Centran Oficejon ĝis la 15a de oktobro.

Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen Subtenas la plivastigon de la librokolektoj de Esperanto-bibliotekoj. Tiun ĉi specialan kason de UEA donacis en 1997 la dana Esperanto-poeto Poul Thorsen kun sia edzino Roma, ambaŭ forpasintaj en 2006.

Plej granda potenco kuŝas en la penso

Multon oni jam skribis kaj parolis ĉi-jare pri nia plej grava jubileanto, d-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859-1917). Kelkaj libroj pri lia vivo kaj laboro speciale eldoniĝis, kaj en pluraj mondopartoj esperantistoj honoris lian memoron per diversaj omaĝoj.

Ankaŭ ni volas fari omaĝeton al tiu granda edukisto, sed per maniero simpla kaj amiketosa, kiel konvenus al kara estulo, kiun delonge ni ne vidas kaj subite aperus por babili kun ni.

La ludo estas jena: ĉu la vortoj de la iniciatinto de Esperanto ankoraŭ aktuale eĥadas en la esperanta komunumo aŭ la mondo tiel ŝanĝiĝis, ke liaj vortoj sonas fremdaj al nuntempaj movadanoj?

Sekvas specimeno de imagebla intervjuo kun nia karmemora vizitanto el fora tempo kaj batalkampo.

Amuzan kaj pensigan legadon!

spertulo

D-ro Esperanto



“Tuta cento da plej grandaj elpensoj ne faros en la vivo de la homaro tian grandan kaj valoran revolucion, kiun faros la enkonduko de lingvo neŭtrala internacia... Dank’ al Esperanto reciproke sin komprenas ĉiuj homoj... kaj pli aŭ malpli frue la tuta mondo fariĝos unu granda homa gento, konsistanta el diversaj familioj interne apartlingvaj... sed ekstere samlingvaj.”

L.L. Zamenhof

Brazilei: *Esperantistoj el pluraj mondopartoj je la 95a foje renkontiĝos por ĝui sian plej prestiĝan kulturajn eventon, kiu okazos en Havano/Kubo. Nuntempe oni multe diskutas pri la aranĝo de niaj UK-oj. Laŭ vi, kiaj estu tiuj aranĝoj?*

D-ro Esperanto: La kongreso devas efiki sur la sentojn kaj fari impreson, kiel eble pli grandan kaj neforgeseblan impreson. Multe da soleneco, muziko, efektoj por la okulo ktp; ju pli ni efikos sur la sentojn, des pli niaj kongresoj, kaj sekve ankaŭ nia afero, fariĝos popularaj en la mondo. Estas domaĝo, ke ni devas akiradi la mondon en tia maniero; sed la homoj havas tian naturon, ke oni povas ilin venki nur per la sentoj, dum per seka parolado vi neniun konvinkos.

Brazilei: *Freŝdate en la revuo Esperanto aperis artikolo pledanta por uzo de la 'bona lingvo'. Laŭ la artikolisto, literaturistoj grave kontribuas al la evoluigo de Esperanto, sed tio ne signifas, ke ilia kontribuo estas pozitiva. Laŭ via opinio, ĉu la timo, ke la esperanta vortaro minacas fariĝi same ampleksa kiel tiuj de la naciaj lingvoj estas pravigebla?*

D-ro Esperanto: Pro la unueco kaj senkonfuzo ordo, kiuj estas por nia afero tiel gravaj, la libroj instruaj devas esti pedante konservativaj eĉ en la plej malgranda bagatelo!! Sed en verkoj literaturaj, kiuj havas la celon perfektigi kaj riĉigi la lingvon mem kaj helpi al la iom-post-ioma kreado de ĝia formo estonta, en verkoj, kiuj devas servi por homoj, kiuj nian lingvon jam konas, kaj kiuj scias tre bone diferencigi inter formoj efektive ekzistantaj kaj formoj prove proponataj, — en tiaj verkoj la aŭtoroj laŭ sia bontrovo povas permesi al si diversajn deflankiĝojn de la komuna stilo kaj eĉ ŝanĝojn gramatikajn. (...) kaj per tia maniero nia lingvo sen videblaj ŝanceliĝoj pace irados sian vojon kaj perfektigados sen la plej malgranda malordo kaj sen la plej malgranda maloportuneco por la lernantoj, kiel ĉiu alia lingvo, kiu ankaŭ ĉiam perfektiĝas kvankam tute nerimarkeble por ĝiaj uzantoj kaj sen iaj arbitraj ordonoj aŭ disputoj.

Brazilei: *Rilate tradukadon, ĉu vi opinias, ke diverseco de formo malfaciligas la lernadon de la lingvo? Plie, ĉu vi kredas, ke detala esperanta gramatiko estu pli populara inter la lernantoj por ke la lingvo-uzo iom post iom pli unuece fiksiĝu?*

D-ro Esperanto: Se (...) ia frazo en unu loko estas tradukita tute alie ol en alia loko, tio ĉi tute ne montras, ke la lingvo ne estas fiksita, tio ĉi montras nur, ke a m b a ŭ frazoj estas bonaj, kaj en tiaj okazoj ordoni al la lernanto “parolu nur tiel kaj ne alie” — ŝajnas al mi tute superflua malfaciligado. Laŭ mia opinio estus necese, ne ke [oni] verku teorion detalan gramatikon, sed ke [oni] verku kiel eble pli da praktikaj libroj (diversaj literaturaj tradukoj); el tiaj (...) libroj ĉiu povus lerni la lingvon kun ĝia tuta vera kaj unuforma spirito multe pli bone, pli facile kaj pli precize ol el la plej dika gramatiko.

[Originale: mi]

Brazilei: *Manke de novaĵoj, multaj esperantistoj rezignas plu ĉeesti en la vivo de loka asocio aŭ grupo, kaj transiras al interreto kie ĉio okazas rapide kaj alloge. Ĉu vi opinias, ke Esperanto rapide disvolviĝas en tiu nova medio?*

D-ro Esperanto: La afero “Esperanto”, nia etika movado, konsistas ne en rapideco, sed en certeco. Multe da sencelaj aferoj ekbrilis antaŭ la mondo rapide, sed ankaŭ rapide falis. Afero bona kaj certa progresas ordinaro malrapide kaj nur kun grandaj malhelpoj. Ne malĝoju tial, esperantistoj!... Ni laboru kaj esperu!

Brazilei: *Kial, post pli ol 120 jaroj da praktika uzado de la lingvo plej multaj esperantistoj ankoraŭ timas esperantigi personajn nomojn?*

D-ro Esperanto: (...) la fonetika skribado de multaj nomoj kaŭzus tro grandan kriplajon de tiuj nomoj kaj diversajn malkompreniĝadojn. Sed tio ĉi estas nur rimedo provizora; ni devas celadi al tio, ke pli aŭ malpli frue en la lingvo internacia ĉiuj nomoj estu skribataj laŭ la fonetiko

internacia de tiu ĉi lingvo, por ke ĉiuj nacioj povu legi ĝuste tiujn nomojn. Tial ĉiuj personoj, kiuj ne timas tro kripligi aŭ nerekonebligi sian nomon per skribado fonetika, povas jam nun skribi en Esperanto sian nomon laŭ maniero esperanta. Jen estas la kaŭzo, kial mi skribas mian nomon per Z, kvankam ĝi havas devenon germanan.

Brazilei: *Novaj lingvo-projektoj ne ĉesas aperi. Komparante Esperanton kun tiaj projektoj, kutime ni diras, ke Esperanto estas la nura arta lingvo kiu postvivis sian kreinton kaj plu evoluas tute nature. Ĉu tiu komparado estas oportuna?*

D-ro Esperanto: Parolante pri nia lingvo, ni ne devas sen bezono paraleligi ĝin (...) kun la diversaj efemeraj projektoj, ĉar en la okuloj de la amaso, kiu kritiki ne scias kaj ne volas, tia paraleligado diskreditigas nian aferon, prezentante ĝin kiel “unu el multaj”.

Brazilei: *Multaj scienculoj kaj kleruloj ne povas nei la ekziston de Esperanto; ili tamen vidas ĝin ne kiel lingvon, sed kiel nuran helpan kodaron por komunikado similan al fingrolingvo. Ĉu tio ne estas iom elreviga?*

D-ro Esperanto: Ni esperantistoj montros al la mondo, ke reciproka kompreniĝado inter personoj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla..., ke la ideo de arta komuna lingvo estas ne ia fantazia revo, sed afero tute natura... tiel, ke niaj nepoj eĉ ne volos kredi, ke estis iam alie kaj la homoj longan tempon povis vivi sen ĝi.

Brazilei: *La interna ideo de Esperanto puŝas kelkajn samideanojn al tiu kredo, ke la lingvo pacigos la mondon. Ĉu tia sintenado ne malhelpas la diskonigadon mem de la lingvo?*

D-ro Esperanto: Neniam ni kredas, ke Esperanto faros el la homoj anĝeloj, ĉar... la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj. Sed ni

kredas, ke interrilato kaj konatiĝado sur neŭtrala lingva fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de tiuj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de la malbona volo, sed simple de sinnekonado kaj de devigata sinaltrudado.

Brazilei: *En kelkaj mondopartoj la homoj ĝuas kelktempan interpaciĝon. Via opinio, kio ankoraŭ mankas en la mondo por ke la homaro ĝuu plej grandan feliĉon?*

D-ro Esperanto: Post la terura mondmilito, kiu starigis la homaron pli malalten ol la plej sovaĝaj bestoj, [la mondo] atendas... ne kelktempan interpaciĝon, sed pacon konstantan. La sola rimedo, por atingi tian pacon, estas: forigi por ĉiam la ĉefan kaŭzon de la militoj, la regadon de unuj gentoj super aliaj gentoj. Jen la plej granda malfeliĉo de la homaro!

[originale: Eŭropo]

Brazilei: *Por fini, vian novjaran mesaĝon al la instruistaro.*

D-ro Esperanto: Ni semu kaj semu, neniam laciĝu, pri l' tempoj estontaj pensante...

Konsultfontoj:

- *Leteroj de L.L. Zamenhof Vol I, II - SAT, Parizo, 1948*
- *Pensoj de Zamenhof, Svisa Esperanto-societo, Bern, 1945.*
- *Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 2 - Ni laboru kaj esperu!, eldonejo Ludovikito, 1974.*
- *Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 6 - Kun grandaj paŝoj eksterlanden!, eldonejo Ludovikito, 1979.*

TERAPIO estas la arto kuraci, aŭ difinita kuracmetodo. Ĝi estas rimedo por atingi reekvilibron de la sano, aŭ por superi malsanon, fizikan aŭ spiritan. Kiam okazas malharmonio en la fizika parto de la homo, aŭ en lia menso, estas necese ke li serĉu la helpon de iu terapiisto (profesiulo, ĝenerale medicinisto, kiu praktikas unu aŭ plurajn terapiajn metodojn). Li kapablas mildigi aŭ kuraci la malekvilibron de la sano. Ekzistas diversaj tipoj de Terapio: hidro aŭ akvoterapio; lumo aŭ fototerapio; fito aŭ plantoterapio; fizioterapio (per varmo, frido, ripozo, masaĝo, gimnastiko, ktp).

Tre utila estas Okupoterapio. Ĝi inkluzivas diversajn aferojn, tio estas: pentrado, desegnado, skulptado, lignaĵo-arto, manlaborado, gravurado, muziko, kanto, aŭ iu ajn okupigo aŭ ŝatokupo al kiu oni dediĉas iom da tempo, kaj tiel forgesas, almenaŭ dum kelkaj horoj, siajn proprajn problemojn, kiuj kaŭzas malekvilibrojn aŭ mankon de harmonio, kiel streso (mensa laco), soleco, deprimo, senkuraĝeco, senti sin sencela, senutila, kun manko de memestimo kaj memfido.

Sin dediĉi al iu lernado ankaŭ oni konsideras utila okupiĝo aŭ okupoterapio. Se iu junulo aŭ maljunulo decidas partopreni en iu elektita kurso, aŭ sin dediĉi al determinita lernobjekto, ĉi tio estas bona okupo por la spirito, pligrandigo de la kono kaj plivastigo de la kulturo. Estas ankaŭ tre bona ebleco por ekgajni novajn amikojn kaj eskapi el sia izoleco. Ĉi tiaj agadoj rezultas je memkontenteco kaj ĝojo por la homo, kiu tiel sentas sin pli feliĉa. Ĉi tio ankaŭ estas utila por lia sano, fizika kaj mensa, kaj por lia harmonio kun la vivo.

Kiam iu faras sian eblon por lerni eksterlandan lingvon, sed ne sukcesas ĝin bone lerni, tiu persono eble sentas sin frustrita. Lingvoj, ĝenerale, estas malfacilaj, ĉar ili estas plenaj je malperfektaĵoj,

malregulaĵoj kaj esceptoj. Ĉi tio malfaciligas ilian lernadon. La lernado de iu lingvo postulas grandan kvanton da tempo, mono kaj sindediĉo, sed la rezultoj, preskaŭ ĉiam, ne estas kontentigaj. Tial, la lerninto sentas frustrigon; li sentas sin nekapabla, malforta je inteligento, malfeliĉa, malsupera, ĉar li ne sukcesis lerni la alilandan lingvon almenaŭ ĝis akceptebla grado.

Ĝuste en tiu ĉi cirkonstancaro aperas la Esperanto-Terapio, por redoni al la kompatinda ekslernanto novan animon, memfidon kaj memestimon. Tial li superas sian komplekson de malsupereco!

La lingvo Esperanto, pro sia simpleco, klareco kaj reguleco, ebligas ke iu ajn persono estu kapabla vere lerni ĝin; por legi, skribi, paroli kaj sin komuniki en tiu ĉi lingvo. De tio rezultas ke tiu persono denove sin sentas memfida, valorigita, feliĉa kaj gaja; kaj li ne plu sentas sin nekapabla kaj neinteligenta.

Al tio ĉi oni nomas efekton de la Esperanto-Terapio, ĉar ĝi redonas al tiuj personoj fidon pri ilia kapablo lerni alian lingvon.

Jen la avantaĝo lerni Esperanton! Ĝia lernado estas tiel plezuriga ke oni ne devas flankenlasi ĝin!

De 11 jaroj Prof. inĝ. Alberto Flores gvidas kurson de Esperanto por maljunuloj en Asocio de Emeritoj kaj Pensiuloj de Volta Redonda (AAP-VR). La lecionoj okazas ĉiumerkrede en komforta lernoĉambro ekipita per moderna instruilaro. La kurso, celanta homojn kiuj iel vidas lernadon de Esperanto kiel okupterapion, estas senpaga kaj ĉiu leciono daŭras unu horon kaj duonon.



Foto: Aloisio Sartorato

FERIAJ KURSOJ



En Brazilo okazas du lernejaj libertempoj dum la jaro: januare kaj julie. Multaj prilingvaj enlandaj kursejoj ofertas en tiuj periodoj siajn tradiciajn feriajn intensajn kursojn, inter kiuj tiujn perfektigajn. Kaj la demando tuj stariĝas: se tiaj feriaj lecionoj estas tre popularaj en privataj kursejoj, kial la esperanta komunumo apenaŭ esploras tiujn latentajn kurso-opciojn?

Unu el la motivoj povas esti tio, ke privataj lingvaj lernejoj bezonas monon interalie por pagi la salajrojn de siaj instruistoj, kaj tial ili esploras ĉiajn enspezo-opciojn; esperantaj kursgvidantoj, male, volontulas dum la instrumonatoj kaj sopire atendas tiujn ripozmonatojn por ankaŭ libertempoj. Laboro finita, ripozo merita. Nenio pli justa.

Rilate la julian libertempon, iu povas memori, ke dum la tutlanda Esperanto-kongreso oni jam okazigas fulmkurson de la lingvo. Tio estas vero, sed tamen ne la tuta vero. Pro manko de diskonigado, tiu baza julia kurseto celas nur akompanantojn de kongresanoj.

Ni pensu do pri la januara libertempo. Se eblas al iu kursgvidanto rezervi iom da tempo por si januare, ĉu ne valorus la penon investi ĝin en ferian provo-kurson? Tia kurso povas okazi dufoje semajne (po du horoj kaj duono lecione) aŭ unufoje semajne, (po 5 horoj lecione, kun paŭzo por tagmanĝo). En ambaŭ ekzemploj la lernantoj ĉeestas entute 20 instruhorojn. Tio estas tempo sufiĉa por gvido de enkonduka baza kurso. Se la kursejo estas pruntita de iu organizaĵo, kies aktivado-kalendaro malplenigas la medion je homa ĉeesto dum tiuj libertempaj monatoj, oni povas serĉi alian lokon, ekzemple bibliotekon aŭ kulturdomon, por okazigi intensan farian kurseton de Esperanto speciale en januaro kaj aŭ julio.

Ĉe ni brazilanoj oni ne kutimas gvidi kurson de Esperanto dum lernejoj libertempoj, kaj tio estas iom komplenebla. Malpli komprenebla estas tiu kurioza enlanda tradicio: plej multaj esperantaj grupoj malfermas novajn kursojn nur komence de marto kun tia pravigo, ke februare la tuta lando turnas sian atenton al la karnavalo...

Dume en la ordinaraj instrumonatoj...

Kio pri la ordinaraj lecionoj en via esperanta grupo? Ĉu lernantoj pli kaj pli ofte horplende akompanas la lecionojn? Eble venas la tempo pripensi praktikan manieron kongrui la horaron de la lernantoj kun tiuj de la kursaro. Espereble la suba raporto pri interesa instruformulo, uzata de francaj kursgvidantoj en Esperanto-Asocio de Vendee, iel inspiros vin al bona solvo.

Interŝanĝo de spertoj pri Esperanto-instruado en staĝoj

Henri Masson

La problemo de la departementa asocio Espéranto-Vendée <http://esperanto-vendee.asso-web.com/> pri instruado de Esperanto per tagaj aŭ vesperaj semajnkursoj estas verŝajne sama kaj tre ofta en la tuta mondo pro pli malpli samaj kialoj:

1. tro malgranda nombro da sufiĉe spertaj kaj disponeblaj kursgvidantoj,
2. geografia diseco de la lernemuloj,

3. distanco kaj atingebleco de la kursloko nefavoraj por parto el ili,
4. neebla interkonsento inter kursgvidantoj kaj ĉiuj lernemuloj pri tago kaj horaro,
5. nemalofta rezigno, aŭ forlaso, pro unu aŭ du el tiuj motivoj.

Pro tio, jam de pluraj jaroj, grupeto de kvar kursgvidantoj de Esperanto-Vendée provis alian instruformulon per serio de ses staĝoj okazantaj unu sabaton monate, de novembro ĝis aprilo, t.e. unu tago monate dum ses monatoj, principe la unuan sabaton de la monato se ne estas ĝeno pro festotago aŭ alia kialo. Kursoj komenciĝas de la 9a horo 30 kaj finiĝas je la 16a 30 kun unuhora tagmeza paŭzo por manĝi aŭ pikniki surloke. En ĉiu staĝo partoprenas du kursgvidantoj, kiuj dispartigas inter si la laboron.

Kvankam tiaj staĝoj jam okazis en aliaj lokoj ol La Roche-sur-Yon, oni fine preferis la ĉefurbon de la departemento, ĉar ĝi estas centra.

Montriĝis ke tiu formulo havas diversajn avantaĝojn:

1. la kalendaro estas facile planebla kaj memorigebla;
2. la organizado ne kostas multe, precipe kiam eblas ricevi senpagan ĉambron;
3. la organizado estas ne komplika, ĉar ne necesas prepari manĝojn (ĉiu alportas sian tagmanĝon aŭ sandviĉojn) kaj plani tranoktadojn (ĉiu reiras hejmen post la fino);
4. homoj kiuj ne povus veni semajne en vesperaj kursoj povas pli facile liberiĝi unu plenan sabaton kaj rezervigi ses sabatojn sur sia agendo;
5. interkonatiĝo de la lernantoj kaj kursgvidantoj estas pli facila, kaj sekve la etoso estas pli agrabla, foje ĝoja, pli favora al bona asimilado. Ĉiu staĝo havas fakte ian neantaŭvideblan sed interesan “kolektivitan personecon” aŭ “gruppersonecon” pri kiu valorus esplori.

Se la formulo interesas vin ie ajn en la mondo, ne hezitu ĝin alproprigi al vi, ĝin adapti, plibonigi, pliriĉigi, kaj... informi nin pri viaj propraj spertoj, proponi ideojn.

Koncerne informadon pri staĝoj, dum ne eblas anonci ĉiun semajnan kurson, male, anonco estas ebla unu fojon monate en la loka amasinformilaro (gazetaro, radio kaj televido). Jen ĉi poste la komuniko dissendita por anonci la duan staĝon:

Staĝo de praktiko de Esperanto, Interreto kaj Skajpo

La dua Esperanto-staĝo, el la serio de ses organizita fare de la asocio Espéranto-Vendée, okazos la sabaton 12an de decembro en La Roche-sur-Yon. Ĝi estos parte dediĉita al Interreto kaj la plej bona maniero uzi ĝin.

La posttagmezo estos rezervita al praktikado de Esperanto per senpaga telefonio per Skajpo, kun kontaktoj en Ĉilio, Meksikio kaj Italio. Tiu parto de la staĝo disvolviĝos en la regiona cifereca spaco de (antaŭ “Cybercentre”), en la kvartala domo de la Verda Valo [sekvas adreso].

Espéranto-Vendée estas kuraĝigita en tiu nova formulo de staĝoj pro la fakto ke la plej granda komunumo de lernado de lingvoj en la mondo, *Livemocha*, en Usono, ĵus aldonis Esperanton al la jam proponitaj lingvoj. La kresko de la eblecoj lerni Esperanton per Interreto ebligas tiel akiri bazajn konojn nepre necesaj por povi partopreni en tiuj staĝoj. Ili estas indikitaj en la rubriko “*Comment l’apprendre ?*” (Kiel ĝin lerni?) ĉe <<http://esperanto-vendee.asso-web.com>>. Kontakto: 02 51 31 48 50. <espero.hm @ wanadoo.fr>.

Dankojn al

Henri Masson, kiu afable permesis la reproduktion de sia teksto, kaj al Germain Pirlot, kiu konigis la tekston.

RETROSPEKTIVO

Februare



2a eldono de **BEL-konferencoj** okazas en la urbo Bandeira do Sul/MG.



Laŭ de la DVD **Esperanto estas...** La diskonigo-filmo, kunproduktita de la brazilano Rogener Paviski, havas subtekstojn en 29 lingvoj kaj estas prezentata en dek lingvoj.

Marte



Nia Espero Esperanto-Grupo (NEEG) okazigas sian unuan **Trejnadon por Kursgvidantoj de Esperanto**, en la urbo Barra Mansa/RJ, kun la ĉeesto de 17 instruemuloj el ses urboj.



Lern-ekskurso al “Bieneto de Floroj”, en la urbo Lorena/SP, fare de anoj el Lorena Esperanto-Klubo.

2009

Aprile

Esperantaj **e-libroj**, plej multaj el la iama eldonejo INKO, de la svisoj Franko kaj Janko Luin, ekgastiĝas en la publika reta biblioteko <www.dominiopublico.gov.br>.



Titulo	Autor	Idioma	Formato	Disponibilidade
...

Maje

Brazila Esperanto-Ligo estas rekonata de CNPq (Nacia Konsilio por Scienca kaj Teknologia Disvolviĝo) kiel serĉesplora organizaĵo promocianta kulturon.



Aperas la unua numero de **Teleskopo** - Internacia Scienca Revuo, faka elektronika eldonaĵo kreita de Dominique Vieira el Federacia Universitato de Goias.



Prof. **David Bianchini** prelegas portugale pri “Naturaj lingvoj kaj artaj lingvoj” en Fakultato pri Beletro de Pontifika Universitato Katolika de Campinas (PUC).



E n l a n d e

Maje



Forpasas la pedagogo kaj edukisto Prof. **Sylla Chaves** (1929-2009), unu el la plej eksperimentaj kaj produktemaj pioniroj de esperantaj lerniloj kaj instruhelpiloj en Brazilo.




Lernekskurso al Aeronautika Altlernejo, en la urbo Guaratinguetá/SP, fare de anoj el Lorena Esperanto-Klubo.

Junie



Lanço de prelego-KD omaĝe al la 40-jara morto-datreveno de **Ismael Gomes Braga**, unu el la pioniroj de Esperanto en Brazilo.

Julie



Lanço de la lernokompleto **“Esperanto por lernejoj klasoj”** (libro plus sondisko), verkita de la lingvinstruisto Josias Barbosa, el Braziljo/DF, kaj eldonita de Unio Planedo kaj Brazila Esperanto-Ligo.

Julie

Lanço de la sondisko 'Repe, ritme, sone...' de la **repisto Tone**, honore distingita de UEA pro sia karakteriza prezentado en la 94a UK.



Aŭguste

Lernekskurso per trajno al la urbo Passa Quatro/MG, fare de anoj el Lorena Esperanto-Klubo.



Septembre

La Komisiono pri Edukado de la Brazila Senato aprobas la leĝoprojekton, de la senatano Cristovam Buarque, kiu permesos la **instruadon de Esperanto en mezlernejoj**. Por ke tiu leĝoprojekto validiĝos tamen necesos ankoraŭ la aprobo de la Deputita Ĉambro.



Retejo de **Época**, unu el plej prestiĝaj enlandaj periodaĵoj, aperigas artikolon pri la leĝoprojekto.



Enlande

Septembre



Maria Nazaré Laroca, el la urbo Juiz de Fora/MG, defendas doktorigan disertaĵon pri “*O caráter verbo-nominal do aspecto em Esperanto*” en la Federacia Universitato de Rio.

Novembre



Ekspediĝas la 100-a libro-pakaĵo kadre de la kampanjo **Esperanto en la Bibliotekojn**, de Kultura Kooperativo de Esperantistoj (KKE), en Rio, per kiu oni jam dissendis pli ol mil librojn al 88 enlandaj kaj 12 alilandaj bibliotekoj.

Decembre



La pola ambasadejo en Braziljo/DF, okazigas cerimonion omaĝe al centkvindekjara naskiĝo-datreveno de la iniciatinto de Esperanto, L.L. Zamenhof (15/12/1859). La ambasadoro, s-ro **Jacek Junosza Kisielewski**, koktele akceptas ĉirkaŭ 70 invititojn, inter kiuj la prezidanton de Brazila Esperanto-Ligo, Prof. José Passini.

Januare

Retkampanjo enketas por instruado de **Esperanto en usonaj lernejoj**, instige al alvoko de la gvidantaro de la ĵus elektita Barack Obama.



Debutas, kadre de la Internacia Festivalo en la germana urbo Düsseldorf, la **novtipa ekzamensistemo de UEA**, konforma al la normoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER).



La gazeto La Ondo de Esperanto elektas **Ilona Koutny** kiel “Esperantiston de la jaro 2008”, pro ŝia gvidado de la Interlingvistikaj Studoj ĉe Universitato Adam Mickiewicz (UAM).



Marte

La Centra Oficejo de UEA anoncas la vendo-enspezojn de sia **libro servo** en la antaŭa jaro. Entute estis disvenditaj 13 707 ekzemplerojn de 2 554 malsamaj libroj kaj diskoj.



Alilande

Aprile



Pola Radio Esperanto memorfestas la 50an datrevenon de sia unua esperanta elsendo kiu okazis la 4an de aprilo 1959, pruvante, per tiu aventuro, la vivantecon de la Internacia Lingvo Esperanto.



Lanĉo de la gvidlibro **Esperanto de nivelo al nivelo** kun specimenoj je ĉiu nivelo de la novtipa ekzaminsistemo de UEA/ITK.



Eksperimenta **Lingva Festivalo** okazas en Nankino, Ĉinio, kun la partopreno de ĉirkaŭ mil interesiĝantoj pri la 27 ofertataj fulmkursoj en 9 lingvoj, inter kiuj Esperanto.

Maje



Edukado.net lanĉas kampanjon por kolekti subtenmonon por rekonstruo kaj savado de sia retejo, post sepjara funkciado kaj ricevo de premio por sia elstara agado, fare de UEA okaze de la 93a UK, en Roterdamo.

Junie

Aperas “Esperanto, fascina lingvo”, **multlingva broŝuro** kun informoj kaj personaj rakontoj pri la lingvo, rete elŝutebla ĉe <http://ikso.net>.



Julie

ILEI sesdekjariĝas kadre de sia historia 42a Konferenco, en la sud-pola urbo Krakovo, kie elektiĝas ĝia nova gvidantaro sub la estreco de **Stefan MacGill** el Nov-Zelando/Hungario.



Septembre

UEA reprezentiga, pere de Zsófia Kóródy, en komuna konferenco de **Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo** (ALTE) kaj Goethe-Instituto, en Berlino, kadre de la programo “Lingvoj sen limoj” kun la ĉeftemo “Lingvo kaj integriĝo”.



Novembre

Lanĉo de la lernilo “**Esperanto em 30 horas**”, verkita de la portugalo João José dos Santos kaj eldonita de la eldonejo Karavelo.



Alilande

Decembre



Edukado.net, partenere kun ILEI, anoncas baldaŭan lanĉon de **reta instruista trejnkurso**. La pilota prov-kurso funkcios tra speciala sekcio de la nova pretiĝanta retejo de *edukado.net*.



Por la 13-a fojo UEA disdonas subvenciojn de la **Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen** (entute 1200 eŭrojn) al sep Esperanto-bibliotekoj en ses landoj, inter kiuj Brazilo.



Ĉina Radio Internacia memorfestas la 45an datrevenon de sia unua esperanta elsendo kiu okazis la 19an de decembro 1964.



Esperanto lerneblas en la socia reto **livemocha.com**, kiu proponas lingvo-kursojn en tridekoj da lingvoj al pli ol kvar milionoj da scivolemaj lernantoj tutmonde. Ĉefa trajto de la senpaga kursaro: ludema lernado kun helpema kaj tutmonda komunumo.

Konsultfontoj:

Gazetaraj Komunikoj de UEA, www.ilei.info, <http://groups.google.com.br/group/soc.culture.esperanto>, www.edukado.net, www.liberafolio.org, www.esperanto.org.br.

PLIRIĈIGU VIAN VORTOPROVIZON

Pretigis: Aleksandro Prado

Ĉi-numere, Brazilei proponas al vi taksilon bazitan sur vortoj el “**Bona Sinjorino**”, romaneto verkita de Eliza Orzeszkowa (1841-1910) kaj tradukita de Kazimierz Bein (Kabe, 1872-1959), konsiderata de “La Ondo” (2000:3) la patro de la esperanta prozo. “Bona Sinjorino” estas elmonro de lia talento belstile traduki. Ja, Kabe flankenlasis E-on, sed malmultaj scias ke li revenis al la movado post sia 80-jariĝo, kaj tuj poste forpasis.



- Parget/o** A – pastaĵo distranĉita laŭ mallarĝa rubando; B - forta ligna stango; C – planko el lignaj tabuletoj; Ĉ – speco de tropika arbo.
- Grifon/o** A – hundo kun longaj hirtaj haroj; B - tre malgranda monero; C - fabela besto kun agla kapo; Ĉ – antikva skribilo por skribi sur vaksumita tabelo.
- Lake/o** A – truo en tekstoj; B – servisto ĉe riĉuloj; C - homo, kiu ne apartenas al pastraro; Ĉ – guma rezino por glazurbiligigi objektojn.
- Lanug/o** A - malvigleco de la korpaj fortoj; B - grasa substanco el la histo de porko; C – granda malpeza litkuseno; Ĉ - tre delikata plumaro kovranta la ventron de birdoj.
- Tul/o** A – densa aro da kunkreskantaj aĵoj; B – longa, kava, cilindroforma ilo; C – artifiko por doni aspekton de realeco; Ĉ – malpeza kaj delikata, travidebla teksaĵo.
- Buk/o** A – movebla pinglo-fiksilo por zono; B – spirale volviĝanta fasketo da haroj; C – felta mantelo de rusoj, poloj kaj kaŭkazianoj; Ĉ – bakita pankuko.
- Zibel/o** A – signo stampita sur moligita substanco; B – mamronĝulo simila al marmoto; C - speco de azia mustelo; Ĉ – mamulo simila al ĉevalo havanta nigrajn striojn.
- Batist/a** A – java metodo tinkturi ŝtofojn per koloraj desegnoj; B – plej delikata tolo el lino; C - subakvebla sfero por observado de la marprofundo; Ĉ – vira nomo.
- Graci/a** A - move plaĉa; B - tre maldika; C = akvo solidiĝinta pro malvarmo; Ĉ – spirita helpo, senmerite donata de Dio.
- Kanap/o** A - psikostimula planto malpermesata en Brazilo; B - longa seĝo por pluraj personoj; C – artefarita akvovojo; Ĉ – ludkarta emblemo.

Respondoj

1. **Pargeto** – [C] planko el lignaj tabuletoj. [opcio A = nudelo] [B = Paliso]. “...ĝi trotetis per malgrandaj paŝoj sur la glitiga pargeto...” p. 3
2. **Grifono** – [A] Hundo kun longaj hirtaj haroj. [Opcio B = groŝo]; [C = Grifo]; [Ĉ = Grifelo] “La malgranda grifono, kiu sin ĵetis al la enirantoj...” p.3
3. **Lakeo** – [B] servisto ĉe riĉuloj. [Opcio A = lakuno]; [C = laiko]; [Ĉ = Lako]. “... – diris ŝi mallonge al la lakeo...” p.4
4. **Lanugo** – [Ĉ] tre delikata plumaro, kovranta la ventron de birdoj. [A = Langvoro]; [B = Lardo]; [C = plumono] “...el la lanugo de la blankaj punktoj sin eliiĝis tondaj piedetoj...” p.12
5. **Tulo** – [Ĉ] malpeza kaj delikata, travidebla teksaĵo. [A = Tufo]; [B = Tubo]; [C = truko] “...da...rubandoj, tuloj... multe estis en la ŝrankoj... de la somerdomo...” p. 8
6. **Buko** – [A] movebla pinglo-fiksilo por zono. [B = buklo]; [C = burko] “...la fajraj haroj kombitaj, parfumitaj, estis kunigitaj per testuda buko...” p.12
7. **Zibelo** – [C] speco de azia mustelo. [A = sigelo]; [B = zizelo]; [Ĉ = zebro] “...kaj al la virino en zibeloj kaj veluro sin turnis...kelke da miloj da homaj okuloj...” p.14
8. **Batista** – [B] plej delikata tolo el lino. [A = batiko]; [C = batisfero]; [Ĉ = baptisto] “...senvestigita... kaj vestita per batista nokta ĉemizeto...” p.15
9. **Gracia** – [A] plaĉa pro ia senpeza harmonio en la movoj. [B = gracila]; [C = glacia]; [Ĉ = graco]. “...ĉi tiuj longaj, maldikaj kruroj... faris ŝin iom malgracia...” p.19
10. **Kanapo** – [B] longa seĝo por pluraj personoj; [A = kanabo]; [C = kanalo] “...Evelino salte leviĝis de la kanapo...” p.29

Kontrolu vian memtaksadon:

Malpli ol tri trafaj respondoj: vi nepre bezonas legi iom pli.

3 – 4: **kontentiga**; 5 – 7: **bona**; 8 – 10: **bonega**

Planata retkurso pri instruado

Laŭ raporto de Stefan MacGill, prezidanto de ILEI

Venis al fino la tritaga estrarkunsido de ILEI en Roterdamo. Pri la unua tago ni jam raportis, kiel ankaŭ pri la prezento de la estraro kaj la ligo al la partoprenantoj de la malferma tago de la Centra Oficejo (gazetaran komunikon de UEA legu en ilia retpaĝo, kie troveblas ankaŭ la plena prezentaĵo en filmita formo).

Mankas nun tempo plene raporti pri la decidoj kaj diskutoj de la lastaj kunsidotagoj, sed ni raportu pri unu lanĉata iniciato: instruistotrejna retkurso. Ni okazigas kelkloke ĉeestajn kursojn, sed ne ĉiu povas aliri ilin. Retkurso valoras pro la vasta alireblo, eĉ se la profundeco de viva kurso estas malfacile konservebla. La intenco estas lanĉi ene de ses monatoj pilotan prov-kurson, liverata tra dediĉita fako ĉe la nova interfaco de 'edukado.net' < www.edukado.net >.

La kurso havos modularan strukturon kun libera lerno-ritmo. La kernkurso estos pri metodiko, antaŭvideble je du niveloj, al kiu necesos aldoni almenaŭ du kromkursojn el elekto de eble kvin, ekzemple: gramatiko, fonetiko, lingvistiko, movado, literaturo. La kursotaskoj estos pritaksitaj de kvalifikitaj gvidantoj, kiuj samtempe mentoras. Filmitaj modelaj lecionaroj ludos gravan rolon en la kurso, kiel ankaŭ multaj ekzercoj kaj la devo pretigi lecionplanojn. La kurso finiĝos per ekzameno, kutime per fizika ĉeesto en renkontiĝo kaj plenumo tie de modela leciono.

La lanĉaj partneroj estas ILEI kaj 'edukado.net', kiuj eldonos diplomojn al kurs-finintoj. Ili plie esploras eblojn partoprenigi oficialan edukejon en la diplomado. La kurso ne estos senpaga, sed per diversaj ofertoj ni vastigos la alireblon kiel eble plej vaste. Ŝlosilaj agantoj estas Katalin Kovats de 'edukado.net' kaj Duncan Charters por ILEI - tiu mobilizos la necesajn fortojn por ke la ligo kontribuu sian parton de la laboro.

Fonto: <http://www.ilei.info>

Ankaŭ nia korpo parolas...

MALSAMAJN LINGVOJN!

Tre interesa estas jena rimarko de Duncan(*):

“ 6] Interesas ankaŭ interne de la Esperanto-kulturo kiel oni reagis al kulturaj diferencoj, ekzemple pri salutado de samideanoj, kolegoj, amikoj.

La kisado ne estas konsekvenca inter kulturoj. Multaj virinoj (kaj ofte viroj) kisas la vangon (aŭ pli precize la aeron apud la vango) unufoje por saluti virinon kaj en multaj kulturoj ankaŭ viron, en kelkaj kulturoj je unuaokaza sinprezento. En aliaj kulturoj (ekz. Hispanujo) oni kisas dufoje.

En Pollando trifoje. Oni kutime instruas nenion pri tiaj kontaktoj, tamen treege gravas unue scii pri tiuj diferencoj kaj due scii kiel kondukti reage al ili. ...”

Sugesto — Kadre de ILEI, ĉu ne eblus antaŭvidi eldonon de libretoj pri tiaj temoj? Eventuale povus kunlabori E-instruistoj kun siaj gelernantoj. Unue eblus eble antaŭvidi retpaĝaron pri tio kaj nur poste, kiam estas sufiĉe da dokumentoj... kaj da intereso en E-medioj... antaŭvidi paperan eldonon.

Kore,

Germain

Ne nur interesa estas la supra sugesto proponata de s-ro Germain Pirlot, el Belgio, sed vere efektiva, des pli ke la esperantistaro pli kaj pli fariĝas plej diversgenta lingva komunumo. Similan kuriozan provon jam entreprenis la brita verkistino Marjorie Bulton en sia libro *Faktoj kaj Fantazioj*, per kiu ŝi atentigas korespondamikojn pri kelkaj zorgoj

(*) Duncan Charters, nuna vicprezidanto de ILEI. (La redaktanto)

rilate poŝtan korespondadon kun alilandanoj. Ĉar la mondo ŝanĝiĝis, supozeble kelkaj tiamaj rimarkoj kaj konsiloj ne plu validas.

La ideo inviti la tutmondan esperantistaron kunredakti gvidilon pri la signifo de kelkaj gestoj en diverskultura medio estas almenaŭ kurioza kaj amuza okupo, kiu nemultan tempon postulos de interesiĝantoj pri la temo.

Kiel instigilon, mi prezentas iujn gestojn, kiuj povas venigi ian momentan ĝenon okaze de kontakto kun alilandanoj. Mankas kontroli ĉe la koncernaj nacioj ĉu la ekzemploj validas aŭ temas pri nura folklorajĵo.

- ★ Tio, kio por brazilanoj signifas “Bonege!” (la dika fingro turnita supren), por loĝantoj de kelkaj hindiaj kaj islamaj landoj aspektas kiel insulto kaj nedeca gesto.
- ★ Voki kelneron, kiel faras brazilanoj (per la montra fingro “jukanta la aeron”), estas nedeca gesto, se farata en japana restoracio.
- ★ Montri unu el la manplatoj al iu, en multaj landoj signifas simplan averton “Haltu!”, sed en Grekio tiu gesto aspektas kiel konfronto-signo, dum en Orienta Afriko ĝi montriĝas pli ofenda ol tio, kion por brazilanoj signifas la meza fingro etendita supren.
- ★ Tio, kion por brazilanoj signifas “petveturo” (movo de la dika fingro indikanta la deziratan vojon), por grekoj aspektas kiel invito por seksumado!
- ★ Se vi kutimas karesi la nazon dum vi aŭskultas vian kunparolanton, evitu tiun geston dum parolado kun nederlandano; male, li pensos, ke vi nomas lin mensoganto.
- ★ Se brazilano volos konfirmi ion per kap-jeso aŭ kap-neo al tajlandano aŭ bulgaro, memoru, ke tiuj niaj kapgestoj estas tute la malo por ili.
- ★ Se vi pensas, ke, metante la manojn en la poŝon, vi evitos problemojn, pensu dufoje dum babilado kun franco, japano aŭ indonezo: por ili tiu gesto montras mankon de edukiteco.

Fonto: Revuo Isto é, Seleções Reader's Digest

KUNMETADO DE VORTOJ

Paulo Sergio Viana

UZU ĜIN KOREKTE

Unu el la plej belaj kaj utilaj elementoj de nia lingvo estas la sistemo por kunmetado de vortoj. Ĝi permesas, ke ni ŝparu stokon da vortoj kaj riĉigu niajn esprimojn.

Oni devas sekvi simplan regulon: unue, ke la radikoj restu senŝanĝaj; due, ke la ĉefa vorto restu en la fino de la kunmetaĵo. Ekzemple: “okulvitro” estas ja vitro, sed ne iu ajn vitro; ĝi estas “vitro por la okuloj”. Inverse: “vitrokulo” estas ja okulo, sed ne iu ajn okulo: ĝi estas “okulo el vitro”.

Oni devas do kutimiĝi al tia sistemo. Por faciligi tion, komparu ĉi tiujn parojn da kunmetitaj vortoj:

SKRIBMAŜINO = maŝino por skribo

MAŜINSKRIBO = skribo per maŝino

INTERNLANDO = lando situanta interne de iu teritorio

LANDINTERNO = interna parto de lando

LERNOLIBRO = libro por lernado

LIBROLERNO = lerno per libro

LEGOLIBRO = libro por legado

LIBROLEGO = lego de libro

KAŜNOMO = nomo por kaŝi la veran nomon

NOMKAŜO = kaŝo de ies nomo

SALONDANCO = danco por salono

DANCOSALONO = salono por danco

MUZIKDANCO = danco per muziko

DANCOMUZIKO = muziko por dancado

FRUKTOSUKO = suko el frukto

SUKOFRUKTO = frukto por suko

ABELMIELO = mielo produktita de abelo

MIELABELO = abelo kiu produktas mielon

ĈASHUNDO = hundo por ĉaso

HUNDOĈASO = ĉaso per hundo / al hundo

*Evanilde Rossi Sandrão eklernis Esperanton antaŭ ĉirkaŭ 14 jaroj, en San-Paŭlo, en la tiama Esperanto-Laborgrupo, kies kursgvidanto estis Mewton José Monteiro. Unu jaron poste ŝi ricevis sian kursateston kaj de tiam plu memlernis la lingvon per la lernilo **Esperanto sem Mestre**, de Ismael Gomes Braga. En 2003 ŝi komencis instrui la lingvon en Mongaguá. Plej multajn kursmaterialojn ŝi mem kreas aŭ adaptas laŭ la aĝoj kaj instruiteco de la lernantoj. Al ŝia instruagado mankas io, nome pli da kontaktoj kun aliaj instruistoj. Sed pro familiaj okupoj, ŝi ne havas multe da tempo fari tion. Kiel lerno-varbilon ŝi ŝatas reliefigi la propedeŭtikan valoron de Esperanto.*



Leciono-tagoj

Jaŭde

14h - 16h. Baza - lernilo: *Ludu kun ni*

16h - 18h. Paroliga - lerniloj: *Iniciação à fala do Esperanto/Kristana Agendo*

Sabate

9h - 11h. Baza - lernilo: *Ludu kun ni*.

Dimanĉe

15h - 17h. Daŭriga - lernilo: *Gerda Malaperis!/ Kristana Agendo*

Babilema Lernogrupo de Esperanto
Av. Dr. Luis Pereira Barreto, 165 - casa 3
Mongaguá - SP - Tel: (13) 35075792

43a ILEI-Konferenco

Matanzas - Kubo ---- 11 - 17 de julio 2010

La konferencejo estos la hotelo Canimao, kiu provizos loĝigon kaj manĝojn por la konferencanoj, kaj disponigos konvenajn salonojn por praktike ĉiuj eroj de la programo. Eventuala simpozio plej verŝajne okazos en universitato en promen-distanco de la hotelo.

Fotoj de la konferencejo estas afiŝitaj en nia retejo (vidu sub 'Konferencoj') kaj en la aldonita PDF-versio. La konferenca oferto inkluzivos transporton de Havano (de la flughaveno al la urbo), kiun la hotelo provizos per minibusoj aŭ similaj veturiloj, sed konferencanoj devas klare antaŭanonci siajn flugojn kaj alven-horojn, aŭ siajn akcepto-dezirojn. La reira transporto al la UK post la konferenco estos laŭplane per komuna buso.

Ni nun kompilas proponojn por konferenca temo, konsultante kun UEA kaj konsiderante la proklamitajn 'Jarojn' por 2010 ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko.

Kiel dirite, la programo havos tri esencajn elementojn, el kiuj ĉefrolas la faka:

Faka programo:

Tio dependos grandparte de la ĉeestantaj fakuloj, kaj antaŭvideble havos pli modestan gamon kaj bunton ol en lastaj jaroj. Tamen, ni strebos al kiel eble plej alta kvalito, kun limigo de la kvanto da paralelaj programeroj. Ĉiutage ĉiuj konferencanoj havos eblon kunveni por unu komuna faka aranĝo – panel-diskuto, forumo, grup-laborado aŭ similo.

Labora programo:

La komitato kunsidos komence de la konferenco, aŭdos raportojn kaj starigos publikajn labor-grupojn. La komisiono pri universitata/scienca agado kaj la lerneja komisiono certe okazigos labor-rondojn, eventuale ankaŭ aliaj komisionoj (terminologio, ekzamenoj...) faros similon. Tie eblos aŭdi pri la faritaj laboroj, kurantaj projektoj kaj estontaj planoj kaj kontribui al mini-projekto elektita por kuna plenumo dum la konferencaj

tagoj. Ĉiutage unufoje okazos paralelaj kunsidoj, tiel ke ĉiu povas elekti kampon pri kiu kontribui kaj kunlabori. Eventuale ni oferos unu fakan prezentaĵon paralele kun tiuj labor-grupoj, por tiuj, kiuj nepre volas nur fakumi! Ni starigos (almenaŭ) unu dum-konferencan komisionon – pri komunikado – kun la tasko pretigi gazetarajn komunikojn pri la konferenco kaj por liveri poste tekstojn kaj fotojn al IPR, revuo Esperanto kaj aliaj revuoj, radio-stacioj kaj hejmpaĝoj. Fine de la semajno la komitato kunsidos denove por aŭdi rezultojn de la laborgrupoj kaj plani la pluirajn laborojn.

Distra programo:

Ni inkluzivos en la konferenca oferto ekskursojn, ekzemple unu tuttagan al la plaĝo Varadero, kaj duontagan pli proksime. La hotelo kompreneble pretas rekomendi aliajn eblojn por unuopaj konferencanoj. Ni decidis koncentri la komunan ekskurs-oferton por ke la faka kaj labora programo havu konvene grandan publikon. La vesperaj programoj, kiel ĉiam, ofertos abundajn eblojn por distrado.

Pliaj programeroj:

Ĉi tiuj estas ankoraŭ planataj, sed ni esperas oferti ion pri instruista trejnado, se ni havos dezirantojn, precipe inter kubaj au latinamerikaj kolegoj. Ekzamen-sesio simile aranĝeblas, se anoncos sin kandidatoj. Pri ebloj por simpozio, oni esploras.

Ni nun finas la interkonsentojn pri la kotizoj, kaj anoncos tiujn tre baldaŭ, kune kun la pretigo de aliĝilo. Tio aperos en la retejo, kaj en IPR 2009/4.

Loka Kongresa Komitato:

Nia estrarano Julián Hernandez Angulo estos la prezidanto de LKK de la Konferenco, Marta Alonso Gutiérrez, la landa sekciestro, estos la vicprezidanto kaj Pedro Fernández, Gonzálo Collantes kaj Yoandra Rodríguez estos la aliaj membroj. En kunsido de la LKK de la 95a UK, ĉiuj konsentis ke Julián prezidos la LKK de la tri internaciaj eventoj: UK, IJK kaj la ILEI-konferenco, por certigi kunordigon de la tri eventoj.

Fonto: Stefan MacGill, Prezidanto de ILEI - <http://www.ilei.info>, el kie elŝuteblas la kompleta teksto, aliĝilo, fotoj kaj la Unua Bulteno.

San-Paŭlo gastigos en 2011 tri esperantajn eventojn, unu el ili eĉ internacian, samtempe kaj en la sama adreso.

46a BKE (Brazila Kongreso de Esperanto)

31a BEJKE (Brazila Esperantista Junulara Kongreso)

8a TAKE (Tutamerika Kongreso de Esperanto)

**Preparu
viajn
lernantojn!**



Mano, skulptaĵo de Oscar Niemeyer
en la Memorialo de Latinameriko.

© 2011 Esperanto - Brazilo. Ĉiuj rajtoj rezervitaj. Ĉi tiu dokumento estas eldonita de la Esperanto - Brazilo. Ĉi tiu dokumento estas eldonita de la Esperanto - Brazilo. Ĉi tiu dokumento estas eldonita de la Esperanto - Brazilo.

Ni deziras al vi
agendon plenan je
interesaj enklasaj
travivaĵoj en 2010!



Novjaroni!
Sukcesan